# VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského klubu v Mnichově Hradišti, pro členy a příznivce mezinárodního jazyka.
Odpovědný redaktor: MUDr Josef Hradil, 29501 Mnichovo Hradiště, Družstevní 1161
Cena: dobrovolný příspěvek
Povolil OÚ Ml.Boleslav, odb.kultury čj.47/87-403/16
Podávání novinových zásilek povoleno oblastní správou pošt Střední Čechy v Praze, čj.P/Fi 2295/92 ze dne 16.XI.1992

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx
Numero 4 Oktobro 1994 Říjen Číslo 4
xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx

## U N I V E R S A L A  K O N G R E S O  1996  E N  P R A G O !

Ni ĉiuj rememoras traktadon de nia asocio kun UEA post la jaro 1989 pri eventuala aranĝo de Universala kongreso en Prago. Baris nesufiĉa fido de UEA pri forto de la movado en nia ŝtato, grandaj financaj postuloj de Ĉedok kaj luo de Kultura Palaco en Prago, problemo de aŭspiciado prezidanto Havel dum la kongreso k.t.p.

Nun venas surpriza sciigo el Prago: Nia prezidanto Ing Vlastimil Kočvara, kiu partoprenis ĉijaran kongreson en Seul, alportis agrablan kaj kuraĝigan novaĵon: Oficiale estis aprobite, ke en la jaro 1996 efektiviĝos la 81-a Universala kongreso de Esperanto (Universala Esperanto Asocio) en Prago. Laŭ traktado kun la prezidanto de ĈEA oni taksas, ke povus partopreni ĉ. 3000 personoj aŭ pli. La kongreso efektiviĝus en Praga palaco de kulturo en la lasta semajno de la monato julio 1996.

La promeso de tiu aranĝo alportos al ĉiu nia esperantisto helpi laŭ siaj fortoj. Kvankam la kongresa kotizo ne estos plimulto da niaj gesamideanoj alpaŝebla, esperantistoj parolantaj kaj uzeblaj kiel organizantoj estos ĉiam bezonataj. Plej malfacile estas ĉiam organizi bonan informan kaj loĝigan servon kaj granda zorgo estas ankaŭ preparo de kulturaj programoj, kiuj senerare ĉiam preparas nia prezidanto. Nun, kiam estas varba sezono de novaj anoj en viaj kluboj, atentigu interesulojn pri eblo partopreni en UKo, kio ne estas ŝanco ĉiujara. Organizu intenzivajn kursojn kaj ankaŭ pliperfektigajn kursoj por anoj pretaj helpi. Anoj el Prago kaj ĉirkaŭaĵo pripensu eblon disponigi siajn loĝeblecojn precipe por eksterlandaj gesamideanoj ne tiom monhavaj, ke ili povus pagi terurajn prezojn en la plej luksaj hoteloj en Prago. Partopreno en Universala kongreso estu komenco de multaj amikecaj ligoj, kiuj dumvive daŭros kaj riĉigos nian vivon. La tutan aferon pritraktu kun la plejgranda seriozeco: La ŝanco revenas en nian ŝtaton nur post tri kvaronoj de la jarcento – la lasta kaj sola Universala kongreso estis efektivigita en nia ŝtato en 1921. Aŭspiciis ĝin tiama ministro de eksterlandaj aferoj Dro Eduard Beneš kaj la kongreso estas ofte rememorata ne nur pro granda partopreno sed ankaŭ pro fondo de la dua plej forta Esperanta organizaĵo – SAT (Sennacia Asocio Tutmonda), kiu ĉijare post multaj jaroj kongresis en Strážnice. Atendu pluajn informojn, kiuj venos el Prago el nia sekretariejo kaj estos publikigitaj en STARTO.

Tamen uzu la tempon, prenu en manojn viajn lernilojn kaj ripetu la lingvosciojn, kiujn vi certe bezonos. Estu pretaj ĉiumaniere helpi al sukceso de la Universala kongreso 96 en Prago!

**RAPORTO PRI LA UKo** La „lando de la kvieta mateno“ kiel oni kromnomas Koreion, povus estu ŝerce nomata „Lando de la kvieta Komitato“ pro tio, ke nur pli ol duono de komitatanoj partoprenis en Seulo. Pluraj spertaj aktivuloj forestis (byli nepřítomni) (kun aŭ sen anstataŭantoj), kun sentebla efiko al la komitataj diskutoj. Ĉefe mankis Hans Bakker, estrarano por financoj, kaj ankaŭ pro eksiĝo la ĝenerala sekretario Ian Jackson. Por lia posteno estis elektita Mark Fettes, rekomendita per 33 voĉoj kontraŭ ses. La reguloj por la agado de la Komitato ne estis ŝanĝataj, tion oni atendas en 1955 en Tampere, kiam okazos elekto de la tuta nova komitato. Sen granda diskuto (pro tio „kvieta Komitato“) estis akceptita la estrara raporto 1993 kaj la buĝeto (rozpočet) por 1995. Novaĵo estis apero de ĉapitro pri la spezkonto en elspezoj de UEA por „movada evoluigo“, t.e. (tio estas) agadoj kaj servoj kaj kernaj organoj. La temo por la estontjara Kongreso estos lige al 50jara datreveno (výročí) de Unuiĝintaj Nacioj“ Ni – la popoloj – unu mondo aŭ disaj eroj“ (překlad podle smyslu: My – národy – budeme jednotným světem, nebo nadále rozdrobeni?). Post Tampere 1995 realiĝos la prokrastita Kongreso en Prago, kiun organizi en 1992 la Estraro taksis neprudente pro la neklara ekonomia situacio, inter la tagoj de 20-a ĝis 27-a de julio 1996. En julio 1997 UKo migros al Adelaido, Aŭstralio. Aliĝpetoj de novaj landaj asocioj ne okazis, tamen estis akceptita Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, kiel la naŭa faka asocio, kaj la Komitato aprobis kunlaborajn kontaktojn kun la Eŭropa Klubo kaj Asocio de Verduloj Esperantistoj. Du novaj honoraj membroj de UEA estis proklamitaj: Raymond Gonin, aktivulo en la franca kaj blindula E-movado, kaj Ada Fighiera-Sikorska, redaktorino de Heroldo de Esperanto dum pli ol tridek jaroj. Daŭras la krizo en Terminologia Esperanta Centro (TEC), pri kiu la Komitato ricevis du raportojn (de W.Borman kaj I. Jackson), ambaŭ pesimismajn. Kvankam ekzistas sufiĉe vasta intereso de la publiko pri evoluigo de la esperanta terminologio, ne aperis volontuloj, por transpreni kernajn taskojn de TEC. Entute partoprenis en la Kongreso 1800 gesamideanoj el 66 landoj, spite la streĉitan politikan situacion en la korea duoninsulo kaj minace de uzo de nuklea armilo, kiel emfazis (zdůraznil) en sia inaŭgura parolado D-ro Kang Young Hun, prezidanto de la korea nacia komitato de la Ruĝa Kruco kaj eks-ĉeministro de la korea registraro. La temon oni traktis en multaj prelegoj kaj diskutoj en laborgrupoj inkluzive de lekcioj de la Internacia Kongresa Universitato. Tiujn laborojn resumas kongresa rezolucio, kiu interalie „konstatas kun ĝojo la kreskantan emon por Esperanto de aziaj socioj“ en Azio tion ekzemplas (je příkladem) la ĉiujare Komuna Seminario inter korea kaj japana junularoj esperantistaj, kiuj okazas alterne en tiuj ĉi du landoj. En la Universala Kongreso partoprenis 240 koreoj kaj 400 japanoj.

El la intervjuo kun Moo-Huyp-HAN, 70jj, esperantisto ekde 1976, fondinto de la populara gazeto „La Espero el Koreio“, kaj prezidanto de la Korea Esperanto Asocio: Nun la KEAsocio havas 133 dumvivajn membrojn, 77 jarkotizintojn kaj 126 individuajn membrojn de UEA. La nombro dum lastaj jaroj iom malkreskis, tamen nun videblas (je možno vidět) plivigligo (oživení) de la membraro danke al UKo kaj IJK (Internacia Junulara Kongreso) en Koreio. Dum 20 jaroj ricevis registraran financan subtenon por eldonado de „la Espero“. Tamen post jaro la subvenco malkreskis kaj estos tute nuligita. En KEA laboras du plentempaj oficistoj (ĝenerala sekretario kaj kasisto) kaj unu portempulo (brigádník), redaktoro de la oficiala „La Lanterno Azia“. Nuntempe multe kreskas la nombro de interesiĝantoj por Eo ĉe radio-amatoroj kaj komputeristoj.

Ĝeneralajn informojn pri Eo ricevas la infanoj en la sesa klaso de la fundamenta lernejo per priinforma artikolo en la deviga lernolibro. Estas tendenco, ke multaj gejunuloj ne ŝatas la anglan lingvon kaj amerikan influon. La angla estas devige instruata, krom la japana, franca kaj germana. Nenia kontakto estas inter la esperantistoj de la Norda kaj Suda Koreio. Dum lastaj monatoj la politikaj interrilatoj ĝenerale malpliboniĝis pro nuklea armado do Norda Koreio, tamen onidire (prý) eŭropaj amaskomunikiloj troige informadas pri la konflikto. (Ĉerpita el Eventoj, Esperanto kaj Esperanto Aktuell)

Plenan ĝuon (potěšení) alportos al vi uzado de Esperanto. Eble vi pro financaj kaŭzoj, aŭ pro malsano, maljuneco ne povas komuniki kun cetera mondo. Vi vivas en izoleco. Tamen vi povas almenaŭ skribi, trovi korespondamikon al kiu vi povas sciigi (sdělit) viajn zorgojn, seniluziiĝojn (zklamání), tamen ankaŭ ĝojojn, atentigi pri beleco de la vivo aŭ via cirkaŭaĵo. Por tio vi devas uzi belan esprimriĉan Esperanton, por ke vi povu plene esprimi viajn sentojn, peti pri kritiko, konsilo, opinio. Aŭ vi povas sendi fotojn, desegnaĵojn, proprajn brodaĵojn, malsekretigi viajn zorgojn, opiniojn, mondkoncepton, diskuti pri aktualaĵoj enlandaj kaj internaciaj. Sur via breto kolektiĝos dokumentojn pri amikaj rilatoj al homoj, kiujn vi eble neniam persone ekkonos, dokumentoj pri via amika kresko, maturado de opinioj, formado de via individueco. Ne forgesu nian „internan ideon“ kiu gvidis nin al studado de la Internacia Lingvo.

Por kio la kluboj? - estas artikolo de Eventoj 2/julio 94 de Nikolo Gudskov celanta dubantojn pri la senco de kluba agado en la Internacia Lingvo. La E-klubo plenumas kelkajn funkciojn:

1. Propagando – disvastigado. Kiel la interesuloj povus ekscii pri E-o?
2. Instruado. La klubo estu centro de loka instruado de E-o kaj garantiu ĝian kvaliton.
3. Lingva perfektiĝo de komencantoj.
4. Rivelo (vyvolání) kaj funkciigo de kapabloj kaj talentoj ĉe klubanoj.
5. Stabiligo de la loka komunumo per parolpraktiko, aktivado, kolekto kaj uzo de biblioteko ktp.
6. Homa kontentigo de la membroj pri amika komunikado.
7. Kontaktigo de lokaj esperantistoj kun E-komunumo; partoprenigo de la membroj en E-vivo, disvastigo de gazetoj, libroj, ks.
8. Stabiligo de la pozicio de loka esperantistaro en la (makro)socio.

Laŭ la aŭtoro la klubo plenumas iun pozitivan socian rolon kaj la neaktivaj membroj havas principan eblecon reaktiviĝi (kio nemalofte okazas). La aŭtoro rekomendas nombron de membroj idealan inter 20-40 anoj. Malpli ol 20 kutime ne sufiĉas plenumi ĉiujn bazajn klubajn taskojn. Pli ol 40 igas membroj disfali en kelkaj malgrandaj grupoj, komenciĝas rivaleco, kvereloj kaj perdiĝo de „marĝenuloj“. Tiam la sola savrimedo estas disdivido de la klubo.

Ĉu niaj ĉeĥaj spertoj harmonias kun la rusaj? Ĉu vi rememoras klubojn, kiuj havis pli ol 40 membrojn? (Prago, Jablonec, Liberec, Brno, Ostrava, Vsetín k.a.) Ĉu la granda nombroj da membroj kaŭzis iam disfalon de la klubo? Eble nur en Pardubice estas du lokaj konkurencaj kluboj. En Liberec iam estis klubo ĉeĥa kaj germana, tamen ili kunvivis harmonie. Skribu vian opinion, kiel devus aspekti modela kluba vivo – ni volonte publikigos ĝin.

En la jaro 1927 Julio Baghy iniciatis „tagon de la libro – 15an de decembro“ proklamante ke ĉiu esperantisto havas la moralan devon aĉeti almenaŭ unu esperantan libron.“ Okaze de la naskiĝtago de la L.L.Zamenhof tiamaniere rememoru lin!

S-ano Evžen Belda, 46841 Tanvald-Šumburk nD, Vítězná 593 – post transloĝo en domon de rentistoj disvendas sian esperantan bibliotekon: multajn neaĉeteblajn tre valorajn esperantajn librojn, poezion, prozon kaj 15 kg valizon da gazetoj kontraŭ simbola prezo 400 Kč por la tuto. La biblioteko portempe troviĝas de la klubo en Jablonec nN. Uzu okazon!

Internacia simpozio pri entreprenado pere de E-o kaj „Dorsa lernejo" pri prevento de dorsodoloroj en penziono ESPERO, SKOKOVY ne okazos pro nesufiĉa intereso de entreprenistoj.

RENKONTIĜOJ: 29..X.-5. XI. TEJO junulara renkontiĝo en Prago. Aliĝoj kaj informoj kaj informoj: Lucie Karešová, Tylova 1262, 50801 Hořice v Podkrkonoší.
Aŭtuna renkotiĝo 13+14.XI. Lichtenfele (Bavara E-ligo, Waterloostr 21, De-86165 Augsburg.
Internacia E-renkontiĝo, Zagrebo, Kroatio (Maria Beloševič, Sveti dub 130, HR-41000 Zagreb – okaze de 900 jariĝo de Zagreb.
18.-20.XI. Kulturaj E-tagoj, Poprad, Slovakio, Sobotské nám – SK 05861
9.-11.X. Antaŭkristnaska E-renkontiĝo en Bratislava: BEKO, Raŝianska 80, SK 83102 Bratislava.
27.XII.-3.I. 38-a Internacia Seminario de Germana E Junularo, Tübingen (Marc Stessgen, Hagerdornstr. 6A, DE-51069 Köln. Temo: „Rubo").
29.XII-02.I. Invito de nova jaro en Prago. Kava-Pech, Dobřichovice 878.
23a Vintra E-feriado, Budapeŝto, -Movilo, Havesi Gy.u.107/II/8, HU 1157
30.XII.-2.I. Silvestra balo+vintra ekskursoj, Poprad, Slovakio.
Ununa semajnfino en Novembro – konferenco de Ĉeĥa EA en Česká Třebová, detaloj ankoraŭ nekonataj – petu aliĝilon ĉe la asocio.
11-a printempa Semajno Internacia 14.-21.IV.95, lingvokursoj, ekskursoj. Kultura ĉiutaga programo, luksa loĝado, kursoj de manlaboroj, katolika edukejo Haus Maria Rosenberg, luksa loĝado. 370-430 DM. Informoj Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweng Str 11. D-53474 Bad Neuenshr- Ahrweiler (Pfalz), rabato por ekssocialismaj landoj, programhelpantoj dezirataj.
Decembra renkontiĝo en Ústí tradicia – precizaj informoj mankas, skribu afable al Ing Josef Kříž, Družstevní 111/11, 40007 Ústí nL.
Pri viaj renkontiĝoj ni volonte informos en nia bulteneto. Tamen ne forgesu ĝian kvartalan .eldonadon. Sendu kontribuaĵojn (koncizajn!). Redakta fermo: 1.III, 1.VI., 1.IX., 1.XII. Ne forgesu, ke nia bulteno havas nur 8p.

El nia leterkesto (kontribuaĵoj dezirataj): S-ano Žák el Opava riproĉas al VF kaj aliaj gazetoj lamentoj, ke la movado velkas, mankas la mono. Li organizis la someran katolikan tendaron en Sebranice. Ĉiuj organizantoj laboras senpage. Kapacito (70) estis jam 3 monatojn antaŭe disvendita; oni preferis enlandanojn pro edukacelo de la tendaro. Eksterlandanoj estis bonvenigataj, se ili estas E-parolantoj kaj helpis konversaciajn rondojn. Ankaŭ nereligiuloj sentis sin bone. La 32-paĝa revuo DIO BENU estas dissendata al 400 membroj de la katolika sekcio senpage!

S-ano Vaněček Josef el Slaný skribe antaŭmetis en sia letero sian kontribuaĵon dum ĉetabla babilado dumseminaria en SKOKOVY-PENZIONO ESPERO. Laŭ lia opinio nia movado splitiĝas senkoncepte en memstare agantajn sekciojn, kiuj ĉiuj ludas nur propra sablo. Ankaŭ UEA ne havas klaran koncepton. Mankas instruiloj kaj metodika gvidado de instruistoj. Li koleras pro „longjara surloke paŝado de E-movado kaj nekapableco" (krom vana diskutaĉado) antaŭeniri. Li pledas por reguloj klaraj kaj koncizaj. (Organizaj sukcesoj de handikapula sekcio rajtigas s-anon V. Elparoli akran kritikon). S-ano Vladimír Rychlík el Žacléř sendis filozofian esejon pri: „Materialismo aŭ idealismo?" en kiu li sur kelkaj paĝoj pritraktas tiun eternan batalon, menciante precipe la filozofion de slovako K.Ján Maliarik. Bedaŭrinde ni ne havas spacon por publiki komplekse la interesan filozofiaĵon. Tamen post via event.peto la studo estas ĉe ni prunte je via dispono.

Movada humuro (Laŭ la Eventoj): La monujo. Dum la lasta MELA (Memzorga E-lagumado) iu nuda virino eniris la lokan kafejon, kaj mendis ĉe la deĵoranto glason da kafo. La vendisto silente, sed senĉese rigardis ŝin. Post iom da tempo ŝi kolere demandas: - Ĉu vi neniam vidis nudan virinon, ke vi tiel gapas min? - Jes, sinjorino, vi vidis multajn. Sed tre interesas min de kie vi elprenos la monon!




**Via** kultura centro Internacia Esperanto-Muzeo A-1010 Wieno – Hofburg -Michaelerkuppel – Tel: 5355145
Malfermita: Geöffnet: Lunde/Montag $10^{00}$ – $16^{00}$ Merkrede/Mittwoch $10^{00}$ – $18^{00}$ Vendrede/Freitag $10^{00}$ – $16^{00}$
Festotage fermita/Feiertage geschlossen

Ĝi estas centrala arkivo por ĉiuj Esperanto-presaĵo – estas profesie prizorgata biblioteko de la Esperanta-literaturo – gvidas sciencistojn, doktoriĝantojn, studentojn kaj aliajn interesitajn personojn dum iliaj esplorlaboroj pri Esperanto – prizorgas daŭran ekspozicion inkluzive de prezentado de filmoj, kompaktdiskoj kaj aliaj medioj per plej moderna teknika aparataro – granddimensie informas neesperantistan publikon pri Esperanto – vaste kaj efike varbas por Esperanto – gvidas tre sukcesajn perkorespondajn kursojn pri Esperanto kaj ĝia kulturo – prizorgas sciencan informservon – kolektas ĉiujn objektojn, kiuj koncernas Esperanton – aranĝas kulturajn renkontiĝojn – eldonas propran revuon – kompilas aktualan biografion de la tutmonda Esperanto-literaturo – daŭre prizorgas gazetaran informservon – ĝoje atendas vian viziton !

Promeno tra nia gazetaro. Se la komencanto jam sentas, ke estas bezonate ne nur legi lernolibrojn kaj deziras kontakti esperantan mondon tra niaj gazetoj, ofte restas stari senkonsile, kiun elekti. Plej preferinde estas legi aŭ almenaŭ trafoliumi (prolistovat) en la klubo ĉiujn. Tamen la kluba vivo nun stagnas kaj ne estas multaj kluboj, kiuj disponigas al siaj membroj ĉiujn gazetojn. Sen organizo ne estus nia movado. Pro tio per membreco kun jarabono (UEA) vi subtenas nian mondan organizon, kiu estas por la movado vivgrava, tamen la membreco pri alta prezo (ĉ. 800) estas nur por kelkaj unuopuloj atingebla. Pro tio estas la unua devo membreco en ĈEA kiu certigos ricevadon de STARTO, nur klopode eldonatan. Estu toleremaj, se ĝi prokrastiĝos. Nur malmultaj povas imagi malfacilaĵojn de ĝia eldonado kaj grandan klopodon servi al siaj legantoj. Nun estas aboneblaj kvankam multekoste ankaŭ aliaj periodaĵoj: Heroldo de Eo, gazetoj de SAT kaj rapide populariĝis EVENTOJ en Hungario eldonata, plej ofta (14-tage) eĉ preze atingebla. Nur tiu gazeto kapablas ĝustatempe anonci pri la Eventoj *Dusemajne aperas la plej ofta E-gazeto* LINGVO-STUDIO, H-1675 Budapest, pk. 87, Hungario Telefono & Telefakso: (+36-1-) 1288258 Petu provnumeron!

klubaj novaĵoj, renkontiĝoj, personaj sciigoj. Gazetoj, kiuj alportas sekajn anoncojn pri klubaĵoj, post certa tempo la ne tro firmajn esperantistojn lacigos. Ili serĉas ankaŭ altnivelajn raportojn el la mondo kaj la konvena gazeto por ili estas MONATO – gazeto, kiu pruvas praktikan valoron de la IL (internacia lingvo). Tamen ni devas respekti, ke pliparto da esperantistoj en Ĉeĥio estas rentistoj ne tro multe monhavaj. Por ili ni klopodas eldoni nian informilon. Dank' al Via subteno en formo de mondonaco ni povas eldoni ĝin pluan jaron kaj klopodas, kvankam nur kvartale, alporti novaĵojn el la esperanta mondo. Krom tio ni rekomendas al vi peti almenaŭ provnumeron de diversaj multaj E-gazetoj, kiuj alportos la vi bildon de E-movado en foraj landoj. Ofte izolulojn nur gazetoj helpas kontakti kun la esperantista mondo.



**ZÁMEK/KASTELO STRÁŽNICE 67-A SAT KONGRESO 16.-23.01.94** ĉ. 400 Kčs
amnesty ai international / La espero 69662 Strážnice, pošt. Schránka 34
*10 telefonních jednotek Při reklamaci kontaktujte prodejce spTELECOM tato karta může být prodávána pouze v neporušeném obalu. Nesmí být mechanicky namáhána (ohybem, tlakem, kroucením) a vystavována vlivu teplot přesahujících 80ºC*
**67-a SAT KONGRESO Strážnice 16.-23.7.1 9 9 4**
**E. LANTI: 67-a SAT KONGRESO Strážnice 16. 7.1 9 9 4**

La Unua telefona karto en Esperanto kaj porokazaj filatelaĵoj (stampoj + reko-glumarkoj) estis eldonitaj okaze la sukcesa 67-a SAT-kongreso en Strážnice. La kongreso estis ankaŭ sukcesa pro multaj amikecaj ligoj, kiuj startis dum kaj post la kongreso inter kongresanoj kaj ĉeĥaj esperantistoj (ofte gastigantaj eksterlandajn gastojn). Informoj pri porokazaj kongresaj eldonaĵoj sendos al Vi s-ano Vladislav Hasala, p.schr.34 CZ 69662 Strážnice.

Nia E-klubo en Mnichovo Hradiště esploras intereson de gesamideanoj pri aŭtobusaj interŝanĝaj vizitoj eksterlanden. Ni pagus restadon de la gastoj en penziono ESPERO kaj kontraŭe estus gastigataj eksterlande. Temas pri 4-5tagaj restadoj en Vieno, germana regiono de Pfalz kaj polaj apudlimaj regionoj. Prezo estus ĉirkaŭ 1000 Kč por plena prizorgo + alpago por aŭtobuso (krompagata). Skribu tiuj, kiuj havus intereson vojaĝadi pogrupe (18 aŭ 45 aŭ 58 personoj).

La 26an de julio 1887 estis eldonita la unua libro de Eo kaj multaj esperantistoj komencis propagandon por deklari tiun tagon al „Esperantotago“ aŭ „Ago-tago“, kiam ni prezentus al publiko ekziston de la IL kaj samtempe varbus tutmonde por ĝi, sendus salutojn al niaj e-amikoj, ĉie laŭ lokaj kondiĉoj. Viajn opiniojn kaj proponojn sendu al EVENTOJ.
PEN-klubo internacia dum sia kunveno en Santiago de Kompostelo (Hispanio) akceptis kiel plenrajtan membron PEN-klubon Esperantan. Ĝi havas pli ol 10000 membrojn-verkistojn (Poetoj-Eseistoj-Novelistoj). Esperantaj verkistoj havas novan spacon por prezenti sin.

Uzu prave prepoziciojn! E K S T E R - signifas:
a) malinterne: Mi staras ekster la domo. Barakti kiel fiŝo ekster la akvo. Tio estas ekster ĉia dubo (pochyby) -
b) kiel sinonimo de KROM: Ekster tio ni povas fari aliajn formojn (Z). Ekster la ortografio, Eo donas al ni ankaŭ aliajn vortojn. - En senco de movo, uzu akuzativon: Iri ekster tendaron. Mi vidis la flamon, mi savis min ekster la pordon (Z). Kun gramatikaj afiksoj: La ekstera mondo. Ekstera parto de la domo. Balaaĵojn (smetí) ekstermaleola korpo ne elportu (Z). Resti en la ekstero … Ne juĝu (neposuzuj) pri afero laŭ ĝia ekstero. Havi tre imponan eksteraĵon (Z). Filmado de eksteraj (pleneraj) scenoj. Eksterigi iun el sia domo. Eksteriĝi el la veturilo. - Prefikse uzata: Eksterurba gastejo. Ministro por eksterlandaj aferoj. Eksterleĝa, eksterordinara afero. Eksterdanĝera, eksterduba.

**Kiel diri?** Praktika esperanta frazeologio de Lentaigne. KORPO – daŭrigo.

Havi, ricevi, senti kapturnon. Leviĝi ĝis kapturna alto. Meti ion kaploken, frontloken. Sin ĵeti en la akvon, la kapon antaŭen. Reveme (zasněně) balanci la kapon. Honesta de verto ĝis la plandoj. - VANGOJ: (tváře) kavetaj (vpadlé), kaviĝintaj, enfalintaj, pufaj (nafouklé), rondaj, sulkoplenaj (vrásčité). Vangoj brulas post plorado. Vangofrapo (facka). Survangi iun, vangofrapi. Mi volonte donus al mi vangofrapojn. Al tiu, kiu frapas vin dekstran vangon, turnu ankaŭ alian. - Mentono: havi duoblan mentonon. Mentonrimeno de kasko (přilba). - Frunto: Kuntiri, sulkigi, kunŝovi la brovojn (obočí). Lia frunto nubiĝas (zamračí). Kruta (strmé) frunto. Faltiĝinta frunto. Tempia (skráň) faltaro. Porti sur la frunto la signon, la stampon de io. Havi grandan, inteligentan frunton. Fruntalo (=fruntala osto). - BARBO: bele kombita, distaŭzita (rozcuchané). Ĵuri (přísahat) je la barbo de 1 profeto. - Nazo: rekta, kurba, hoka, plata, kuspita (nakrčený). Nazaj kavoj, sonoj. Septo. Lobo (alo - chřípí). Vibriso (haroj en naztruoj de homo). Nazo de plugilo, kruĉo, ŝipo, aviadilo. Platnazulo. Nazfluo. Muko. Mukplena nazo. „Mungi“ (smrkat) sian nazon. Kiu ne sentas sin nazmuka, ne viŝu la nazon. Ricevi nazofrapon. Teni la nazon supren. Iri laŭ sia nazo. Sekvi sian nazon (agi laŭ instinkto). Konduki iun je la nazo. Vidi nur ĝis la pinto de sia nazo. Platigi sian nazon sur la fenestra vitro. Brova arko. Kuntiri brovojn. Glabelo. Ruĝigi ĝis la oreloj. Gustoburĝonoj de la lango. Montri moke al iu la langon (eletendi langon). Mordeti al si la lipojn.

La estontan numeron de VERA FAMILIO vi ricevos nur komence de januaro. Pro tio jam nun por la kluboj, forton firmiĝon, fidelecon kaj por niaj legantoj sanon kaj vivkontenton en la NOVA JARO 1995 deziras la redaktejo.

LASTAMOMENTE: La konferenco okaze 25.jaran datrevenon de ĈEA okazos 4.-6.an de novembro 94 en Česká Třebová, JKP Kozlovská dolina. Delegitoj 155 Kč, Gastoj 255 Kč, Aliĝiloj: Věra Podhradská, Poříčí 1, 60300 Brno.